Johannes R. Becher,

# Laca

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Laca estas mi, nun ĉesu
Fine suferado ĉi,
Volas mi, ke mi forgesu,
Forgesita estu mi.

Ho, lacegas mi de ĉio
De multjara peno ĉi.
Falas de la arb' folio,
Iras en malhelon ni.

*Traduko de la Germana poemo "Müde" de* Johannes R. Becher *(∗1891-05-22 – †1958-10-11) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2004-09.*

*MR-424-1 / Arg-799-1603 (2013-01-30 22:33:39)*

*Pri la poeto vidu la retejon* http://de.wikipedia.org/wiki/Johannes_R._Becher.